Johann Wolfgang von Goethe,

# Martrankvilo

*tradukita de Richard Schulz*

Silentego en la akvo,
Sen ondado nun la mar',
Zorgoplenas la ŝipestro,
Malstreĉitas la velar'.[2]
Triste staras nun la masto.
Semoveco kun terur'!
En la giganteca vasto
Morta ŝajnas la natur'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

# Mara trankvilo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Kalmo regas sur la maro
Kaj senmove kuŝas ĝi.
Zorge vidas la ŝipisto
Glatan facon ĉirkaŭ si.
De nenie blovas vento!
Mort-trankvilo en la rond'!
En enorma la silento
Ne moviĝas iu ond'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,

# Meeres Stille

Tiefe Stille herrscht im Wasser,
Ohne Regung ruht das Meer,
Und bekümmert sieht der Schiffer
Glatte Fläche ringsumher.
Keine Luft von keiner Seite!
Todesstille fürchterlich!
In der ungeheuern Weite
Reget keine Welle sich.

...

[2] Rikardo Ŝulco skribis erare:
Zorgoplene la ŝipestro
Vidas pendi la velar'. (Mankas tie la akuzativo.)

*Traduko de la Germana poemo "Meeres Stille" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

*Arg-267-539 (2013-02-26 15:13:25)*

*Tiu ĉi poem-traduko aperis presita en 1984 en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiun eldonis la konata Esperanto-poeto Rikardo Ŝulco (Richard Schulz), kiam li loĝis en la germana urbo Mindeno (Minden). La kvaran kaj kvinan liniojn de la poemo mi, Manfred Retzlaff, provis en 2004-09-08 plibonigi; ĉar Rikardo Ŝulco erare neglektis, ke post la vorto "vidas" oni devus uzi la akuzativan formon "velaron". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Traduko de la Germana poemo "Meeres Stille" de* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983-10.11.*

*MR-103-3 / Arg-267-538 (2004-09-08 15:26:09)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Johann Wolfgang von Goethe *(∗1749-08-28 – †1832-03-22).*

*Arg-267-537 (2004-09-08 15:24:10)*